

LA KONSTANTVALORA MONO KAJ LA KRUDMATERIALNORMO

D-ro W. P. ROELOFS

En la jaroj 1931 kaj 1932 la nederlanda profesoro J. Goudriaan en pluraj artikoloj en *Economisch-Statistische Berichten* kaj *De Economist* kaj en anglalingva broŝuro titolita „*How to Stop Deflation?*” (London, 1932) prezentis kaj defendis proponon por haltigi la katastrofan falon de la prezoj, por relevi ilin al profitopromesa nivelo, kaj por tiel fari finon al la ekonomia malviglo rezultinta el la Wallstreet-krizo de la aŭtuno de 1929. Kiam ĉi tiu krizo trafis la mondon, regis la ornormo. Fiksita ja estis la prezo de la oro, unu varo el multaj, kaj ekster la mona sfero nur tre malgrava; sed la prezoj de la ekonomie gravaj varoj povis unuope kaj kolektive libere varii. Jam delonge kelkaj ekonomiaj pioniroj, inter kiuj S. Gesell kaj prof. I. Fisher, estis pledintaj por mono konstantaĉetpova. Ankaŭ la propono de prof. Goudriaan celis tion. Por ĝin atingi li proponis anstataŭigi la ornormon per krudmaterialnormo. La bileteldonaj bankoj, anstataŭ deve aĉeti oron je fiksita prezo kaj vendi ĝin je prezo iomete pli alta, estu devigataj simile aĉeti kaj vendi „pakaĵojn” de fiksita konsisto, enhavantaj ĉiujn gravajn primarajn materialojn stapleblajn (grenojn, semojn, grasojn kaj grasajn oleojn, tropikajn produktaĵojn, teksfibraĵojn, metalojn, mineralojn, ktp.) proporcie al ilia jara konsumo. Tio signifas, ke la prezo de tia „pakaĵo” estus fiksita. Ja eblus ankoraŭ variado de la unuopaj prezoj, sed la ĝenerala grandkomerca prezonivelo estus fiksita; almenaŭ ĝi ne plu povus fali, ĉar, se mankas aĉetovolo aŭ aĉetopovo ĉe la publiko, la bileteldona banko *devas* aĉeti je fiksita prezo.

Ĉi tie do tuj vidiĝas la malfortaj flankoj de la sistemo. Kvankam deflacio ne plu eblus, antaŭvideble la materialstokoj de la bankoj montrus — almenaŭ en tempoj pacaj — daŭran tendencon kreski, kreskadi ekster ĉiujn raciajn limojn, kaj dum oro en stoko ne povas pereji, la plimulto el la materialoj en la „pakaĵoj” perdus valoron dum tenado. Tio signifus perdon kaj por la banko, kaj por la socio kiel tuto. La dua malforta flanko estas, ke la unuopaj prezoj povus ankoraŭ forte varii, ekzemple pro varioj en la rikoltoj. Por tion eviti oni bezonas apartajn bufrajn stokojn, kaj tio ja estas, pro ĝia amplekso, tasko por mondorganizaĵo.

Post la milito ni spertis ĝis nun ne deflacion, kiel en la jaroj tridek, sed inflacion, se ne saltan, do tamen rampan. Ĉu ĝi estus evitebla per la sistemo de prof. Goudriaan? Nu, se la prezoj tendencas leviĝi pro abunda demando, la bileteldonaj bankoj devus vendi el siaj stokoj, kiuj en tiaj cirkonstancoj baldaŭ elĉerpiĝus.

Ĉu ni konkludu el ĉio ĉi tio ke la propono de prof. Goudriaan ne

meritas konsideron? Tute ne! Ni devas konstati ke ĝi ne taŭgas kiel sola aŭ eĉ kiel ĉefa rimedo por eviti kaj deflaciojn kaj inflaciojn. Ĝi povas, tamen, bonege servi kaj kiel fajnregulilo aŭtomata por teni la monon konstantvalora, se la mona aŭtoritato per laŭcelaj, rektaj metodoj krude reguladas la cirkulantan monkvanton, kaj kiel ĉi-koncerna indikilo: — se la krudmaterialaj stokoj de la banko tendencas trograndiĝi, evidente necesas pligrandigi la aĉetopovon de la publiko kaj la kvanton de la cirkulanta mono, dum se la stokoj tendencas nuliĝi, evidente la kvanto de la cirkulanta mono estas tro granda kaj preskaŭ ĉiam tro kreskas (ordinare pro armada politiko de la ŝtato).

Ĉiu unuopa ŝtato povas fari kaj teni la aĉetopovon de sia monunuo konstanta, kaj povas ĉe tio apliki la metodon de Goudriaan kiel fajnregulilon kaj indikilon. Se pluraj ŝtatoj tiel faras, iliaj monkurzoj estos reciproke rigore konstantaj.

Tamen, por garantii ĉion ĉi tion, estas necese formuli tiun konstantvalorecon de la mono en la konstitucio, kaj fari la monan aŭtoritaton sendependa de la deziroj de la registaro kaj provizi ĝin per povo kaj rimedoj adekvataj al ĝia tasko. Sed tio estas jam alia, aparta, pli granda kaj pli grava temo.

4.089.2 : 001 (492)

ESPERANTO KAJ SCIENCO EN NEDERLANDO

En la juli-aŭgusta numero de *Wetenschap en Samenleving* (Scienco kaj Socio), 1957, D-ro G. Hamming publikigis tre bonan, kvarpaĝan artikolon sub la titolo *Taal en Wetenschap* (Lingvo kaj Scienco), kies unuajn 5 paragrafojn li en sesa paragrafo provizore resumas jene:

1. Ni vidis, ke la lingvoj inter si ne montras 1:1-rilaton; tial nepre ne povas ekzisti 1:1-rilato inter ĉiu el ili kaj la vero. La pli multaj lingvoj ne povas esprimi la tutan veron.

2. Ni devas distingi inter precipaj (decidaj) veraĵoj kaj malgravaj, akcesoraj veraĵoj. Kono de la plena vero estas tro granda ŝarĝo por la homa menso.

3. Se por ĉiuj popoloj la sama vero estas konenda, do la naciaj lingvoj (kun maksimume unu escepto) ne povas esprimi ĉi tiun konendan veron.

4. Sub lingva premo ni komprenas, ke la karakterizaĵoj kaj apartaĵoj de iu lingvo havas profundan influon sur la pensadon de la uzanto de tiu lingvo.

5. Ke neniu nacia lingvo povas plene esprimi la konendan veron, estas absoluta formo de lingva premo. Ĉiu lingvo blindigas la popolon ĝin uzantan rilate al konendaj veraĵoj.

6. Se la sciencistoj kaptu la konendan veron, ili trovu lingvon, kiu povas esti en 1:1-rilato al ĉi tiu vero.

7. Dum la plej taŭga lingvo ne estas trovita, lingvodiverseco estas pozitive utila. La lingvodiverseco malpliigas la danĝeron, ke la tuta homaro blindas rilate al konendaj veraĵoj.

En la sepa paragrafo temas pri la efikeco de la lingvo. La aŭtoro parolas pri la tempomanko. Ne temas nur pri tio, ĉu ni povas en iu lingvo esprimi iun veraĵon, sed eĉ pli pri tio, kiel rapide kaj efike iu penso aŭ nocio povas esti enigata en la pensorutinon de studento. Tiu-rilate diversaj lingvoj montras diferencojn. Niaj frazoj konsistas parte el „plenigaj” vortoj kiuj diluas la penson, sed ankaŭ modifas ĝin. Povas esti ke ĝuste pro ĉi tiuj ne-esencaj, diluaj vortoj la 1:1-rilato inter la unuopaj lingvoj ne ekzistas. Kial ja estu 1:1-rilato inter ĉi tiuj diluaj plenigaĵoj? Tamen, ni ne estu tro optimismaj rilate al ilia elimino. Ja montriĝas ke en neniuj lingvoj oni povas adekvate distingi inter esencaĵoj kaj diluiloj. „Se, eĉ, niaj asertoj entenas multajn grajnoj da vero, ĉi tiuj grajnoj ne estas draŝitaj; la lingvo malebligas ke la semeroj estu apartigataj de la ventaĵo. La lingvo, kiu postulas diluon, malebligas ke nia verokono fariĝu kono de la pura vero. Niaj naciaj lingvoj ne permesas puran konon de la konenda vero.”

En pluraj sciencoj oni provas eviti tion per uzo de matematikaj metodoj. Sed la aplikeblo de tiuj metodoj estas tre limigita. Ekster tiuj limoj ni bezonas la lingvon, kaj kondiĉo por vera progreso estas pli efika lingvo.

En sia artikolo plurloke d-ro Hamming faris komparojn inter Esperanto kaj la lingvo nederlanda, kaj ĉe la fino referas al tri siaj artikoloj en *Scienca Revuo*.

En la septembra numero de la sama gazeto, kiu estas la organo de la *Verbond van Wetenschappelijke Onderzoekers* (Asocio de Sciencaj Esploristoj), D-ro L. H. van der Tweel raportis pri sia vizito al la kongreso de la Mondfederacio de Sciencaj Esploristoj (*World Federation of Scientific Workers*) en Helsinko kaj pri sia vizito al Leningrado. Li mencias kongresan incidenton pro miskompreno far la rusoj rezultanta el mistraduko; poste li konstatas ke la rusaj sciencistoj ja estas tre kapablaj, sed ege malbone scipovas „siajn” lingvojn (t.e. la ĉefajn lingvojn de la Okcidento); fine li sugestas ke la angla kaj la rusa estu la oficialaj scienculaj lingvoj.

Reage al tio ĉi, mi publikigis en la novembra numero unupaĝan artikolon, iom moktonan, en kiu mi demandas kial daŭrigi la fuŝadon, se la solvo estas jam delonge por ĉiuj disponebla? Samtempe ĉi tiu artikolo estas enkonduko al traduko de artikolo de d-ro Marek Wajsb lum, *Lingvoj kontraŭ Scienco*, aperinta i.a. en *The Worker Esperantist*, en *Germana Esperanto-Revuo* kaj en *Nederlanda Esperantisto*. La Utrehta sekcio de la Asocio dediĉis en februaro kaj marto ĉi-jare du diskutkunvenojn al Esperanto; ĉeestis 4 ĝis 5 esperantistoj. Pri la

unua kunveno aperis en la marta numero de la organo duonpaĝa raporto. Ni do ne havas kaŭzon por plendi.

Belan sukceson havis ankaŭ s-ro M a k k i n k, kiu sukcesis publikigi fakan artikolon en Esperanto en la *Netherlands Journal of Agricultural Science* 5 (1957) 290-305. La titolo estas „*Examenon de la Formulo de Penman*”. La redakcio aldonis anglalingvan piednoton: „La celo de la *Netherlands Journal of Agricultural Science* estas atentigi laŭeble larĝan rondon de legantoj pri la rezultoj de nederlandaj agrokulturaj esploroj per publikigo de artikoloj en internacia lingvo. Esperanto estas internacia, do la redakcio ne kontraŭis publikigi artikolon en tiu lingvo.” S-ro M a k k i n k mem raportas en *Esperanto* (de UEA) pri kiel li aranĝis la aferon. — W. P. Roelofs.

019.941

(048.1)

RECENZOJ KAJ BIBLIOGRAFIO

820-8,,10/17” : 8.03 = 089.2

Angla Antologio, 1000-1800, la unua parto de triparta Brita Antologio. Redaktis la poezian parton W. Auld, la prozan parton Reto Rossetti. Tradukintoj, krom la nomitaj, F. R. Banham, C. D. A. Capp, J. S. Dinwoodie, A. D. Foote, John Francis, G. C. Jervis, E. P. Ockey, A. Venture kaj G. Waringhien. Marjorie Boulton verkis enkondukan studon pri la angla literaturo el la nomita epoko kaj pri la aŭtoroj reprezentitaj. La libro ampleksas 319 paĝojn; formato: 15 × 22 cm²; flava, tola bindaĵo. Eldonaĵo de UEA. Prezo: 40 steloj plus afranko.

La studo de M. Boulton ampleksas la paĝojn 7-19, la poezia parto la paĝojn 25-182, la proza parto la paĝojn 185-307. Sekvas vortlisto unupaĝa, tripaĝa katalogo de aparte aperintaj tradukoj el la angla literaturo 1000-1800: ĉefe Shakespeare, krome J. Bunyan, D. Defoe (resumoj de Robinson Crusoe), J. Swift, O. Goldsmith kaj R. E. Raspe, kaj kvinpaĝa enhavotabelo.

Mi ne estas kompetenta pri la angla literaturo, kaj por tiaj — sendube do por la granda plimulto el la legontoj — la enkonduko de M. Boulton estas tre bonvena.

Kiun impreson havas la leganto el la 20a jarcento? Multaj el tiuj poemoj kaj kelkaj el la prozaĵoj el longe forpasinta tempo fariĝis al ni tute fremdaj kaj seninteresaj. Nur la plej grandaj, precipe inter la poetoj, vere transvivas jarcentojn. La historioj pri la reĝo Arturo (el la 15a jarcento) min povas jam nek kateni, nek ĉarmi. Chaucer (1340?-1400) (tradukoj de Auld) tamen ankoraŭ kapablas tion, kaj Nicolas Brenton (tradukoj de Rossetti), kaj Shakespeare (tradukoj de Auld, Waringhien, kaj ĉefe Rossetti), kaj plu-